

De Beaufront, enigmo en la historio de Esperanto, laŭ Tazio Carlevaro

Radioprelego de Claude GACOND, SRI 694, 1977.01.26 & 28 & 29

Cl.- Parolas Claude Gacond. Louis de Beaufront ludis ĉefrolon en la historio de esperanto ĝis la Ido-skismo, kiun li favoris. La sinteno de la papo de esperanto subite adepto de konkurenca lingvo restis longe enigmo. La organo Literatura Foiro publikigis artikolon de Tazio Carlevaro, kiu alportas interesajn sciigojn koncerne tiun ĉi enigmon. Ni eklegas al vi erojn el tiu ĉi tripaĝa studo:

«Dum la tridekaj jaroj iu eks-idisto, la sviso Ric Berger, serĉante dokumentojn en la arkivo de la Delegacio, malkovris, ke la vera aŭtoro de Ido estas ne Louis de Beaufront, sed Louis Couturat, sekretario de la Delegacio mem. De Beaufront do estis pajlohomio, nenio alia. Kaj efektive la lingvo estis ellaborita laŭ la Couturat-aj konceptoj de senpera renversebleco en la derivado, tipe matematikista inventaĵo. Nun, vere, oni ne plu bone komprenas: do kial de Beaufront akceptis tiel mallaŭdindan rolon? Ĉu estis eble sekreto en lia vivo, sekreto, kiun Couturat (kiu ne povis mem prezenti sian projekton, estante en la juĝanta komitato) eksciis kaj lerte eluzis?»

Post tiu ĉi enkonduko Tazio Carlevaro donas interesajn sciigojn pri la vivo mem de Louis de Beaufront, kiujn ni ankaŭ legas al vi:

«Louis de Beaufront vivis ekde 1908 ĝis 1935, do dudek ses jarojn, krom kelkaj intervaloj, en La Folie (pri kiu la esperantistoj multe mokis, ĉar folie en la franca signifas frenezo!), izolita farndomo ne malproksima el Grivesnes, Somme. Li estis paganta gasto de familio Guérard, en kies tombo li estis enterigita; sed ankaŭ por siaj gastigantoj li estis mistero. Ili ne havas pli li pli precizajn informojn, ol ni havas.

Markizo de Beaufront mortis en Thézy Glimont la 8-an de januaro 1935 pro pulma edemo. Oni lin enterigis en la tombejo de Maresmontiers la 11-an de januaro. La vilaĝa urbestro registis lian nomon jene: «De Beaufront Pierre Josselin Gérald Eugène Albert Louis. Naskiĝinta en Parizo la 3-an de oktobro 1855, el patro kaj el patrino nekonataj al la deklaro». Sed la 3-an de oktobro 1955 naskiĝis en Parizo neniu individuo nomata de Beaufront Pierre Josselin Gérald Eugène Albert Louis.»

Tazio Carlevaro poste raportas, ke inter 1949 kaj 1967 agema franca esperantisto, Jossinet, interesiĝis pri Louis de Beaufront, kaj pri siaj iompostiomaj eltrovoj li sendis leterojn al Gaston Waringhien. El ili Tazio Carlevaro ĉerpis la ĉisekvajn sciigojn pri la karaktero de Louis de Beaufront:

«En multaj historioj de Esperanto Louis de Beaufront estas prezentata ja kvazaŭ monstro; en Ido-tekstoj li estas la purkora, grandanima heroo, kiu ĉion foroferas por pli bona lingvo. Certe estas, ke li emis montri tendencon al ia grandanimeco, sed ni ne scias, kiomgrade sincera. Li tendencis alkroĉiĝi al eminentaj homoj, ilin imiti, ankaŭ ilian eminentecon, kaj pro tio li poste malproksimiĝis aŭ rompis la rilatojn.

Sekrete, sen veraj amikoj, eĉ malofte sincera, li estis simpatia al malmultaj homoj, kiuj konatiĝis kun li persone. Oni priskribas lin mieleca, kun voĉo ne vira, tre singarda. Li parolis oleece, kiel pastro.

Eble en tio respeguliĝas iom da esperantista mitologio, sed certe io veras. Inter Couturat kaj de Beaufront neniam estis varma simpatio, ĉar Couturat estis homo impeta, agresema, aŭtokrata.»

Tazio Carlevaro forgesas aldoni, ke se Louis de Beaufront estis devigata ludi la rolon de pajlohomio favore al la lingvo-projekto de Couturat, perfidante la lingvon de Zamenhof, ke tio en si mem evidente klarigas, kial inter la du homoj de Beaufront kaj Couturat ne povis ekzisti simpatio. Tazio Carlevaro konkludas tiun ĉi priskribon de la karaktero de Louis de Beaufront aldonante ke: «el la politika vidpunkto ni scias, ke Louis de Beaufront estis katoliko kaj reakciulo. Kiel ĉiu reakciulo tiutempa li estis modera antisemito kaj kontraŭ-Dreyfus-isto. Sed estas nedubeble, ke li havis ankaŭ trajtojn eble interese simpatiajn, preter la gloriga mitologio de la idistoj.»

Vi aŭdis el Svislando la unuan parton el artikolo pri la enigmo de Beaufront, kiun publikigis Literatura Foiro en julio 1976. La venontan semajnon ni legos al vi erojn el la fino de tiu ĉi historie grava teksto. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*